Heinrich Heine,

Libro de la kantoj, Junaĝaj suferoj, IV

tradukita de Manfred Retzlaff

Oreleon almetu al mia kor',
Frapadon vi aŭdos, ho karulin';
Laboras fi-ĉarpentist' en ĝi,
La ĉerkon ĉarpentas li por mi.

frapadas tagnokte en mia sin',
Delonge ne lasas plu dormi min.
Rapidu, ho ĉarpentisto vi,
Por ke ekdormi povu mi!

Traduko de la Germana poemo "Buch der Lieder, Junge Leiden, IV" de Heinrich Heine *(∗1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de* Manfred Retzlaff *(∗1938-11-04) en 1984.*

MR-135-1 / Arg-704-1418 (2012-12-07 09:25:05)